Kontaktu la redakcion: kunfluo@proton.me + 31 6 19 46 48 37 aŭ @kunfluo

BALTIAJ ESPERANTO TAGOJ-59 KAUNAS 2025

# Kunfluo

ĉiutaga informilo de Baltiaj Esperanto-Tagoj
BET-59 · Kaŭno, Litovio · 5–13 julio 2025

**n-ro 5** hodiaŭ: 18 °C morgaŭ: 16 °C merkredo, la 9-a de julio 2025

## EKSKURSA TAGO

### Kion fari, se vi ne aliĝis al la tuttaga ekskurso?

Kvindeko da BET-anoj aliĝis al la tuttaga ekskurso al la regiono Vilkaviškis. En la programo de la ekskurso estas interalie vizito de la loko, kie oni produktas Esperantajn glaciaĵojn (*Art Glacio*). Bonan ekskurson! Kaj certe ankaŭ... bonan apetiton!
Merkredo estas jam tradicie ekskursa tago kaj la kutima programo en tiu tago ne okazas – krom vespere, kiam ni ĝuos du koncertojn.
Sed se vi ne aliĝis al la ekskurso, kion vi faru hodiaŭ? Vi povas kompreneble ripozi en la lito dum la tuta tago aŭ babili kun amikoj en kafejo. Sed Kaŭno estas alloga urbo, kiu donas al vi plurajn aliajn eblojn!
Vi povas ekzemple promeni laŭ la reprezenta promenstrato Laisvės alėja (Aleo de Libereco), kiun vi jam certe vidis. Ĉu vi sciis, ke ĝi estas preskaŭ du kilometrojn longa?
En la centro de la kvartalo Žaliakalnis troviĝas granda parko. Nu, parko, vi povus diri – tion mi havas ankaŭ en mia loĝloko. Sed tiu ĉi parko, Ąžuolynas (laŭvorte: Kverkaro), estas la plej granda parko en Eŭropo kiu konsistas ekskluzive el kverkoj! Se vi estas pli kulturema ol naturema, vi povas ankaŭ viziti unu el la kaŭnaj muzeoj. Tute aparta estas la Diabla Muzeo kun pli ol 3000 eksponaĵoj el la tuta mondo, kiuj rilatas al diablo.
Alia ideo estas viziti la libroservon de BET, kiu funkcias ankaŭ hodiaŭ, laŭ la normala horaro.

**Pliajn ideojn por via libera tago en Kaŭno serĉu en la *Libro por BET-ano*.**

## HODIAŬA PROGRAMO

| | **Merkredo, la 9-a de julio** |
|---|---|
| **09.00 – 10.30** | Matenmanĝo (memstare) |
| **09.30 – 18.00** | Tuttaga ekskurso |
| **13.00 – 14.30** | Tagmanĝo (dum ekskursoj aŭ en la urbo por restintoj en la BET-ejo) |
| **17.30 – 19.00** | Vespermanĝo (memstare) |
| **19.00 – 20.00** | Koncerto de Lucio Avitabile (*Granda salono*) |
| **20.00 – 21.00** | Koncerto de Ĵomart kaj Nataŝa (*Granda salono*) |

## RAPORTOJ

### BET-anoj dancis mezepoke

Ankaŭ hieraŭ okazis ekskurso – ĉi tiu estis tamen duontaga. Ĉirkaŭ kvardeko da BET-anoj iris matene al la mezepoka palaco Raundondvaris, nur kelkajn kilometrojn for de Kaŭno. La gvidantino rolludis kvazaŭ ŝi loĝus tie kaj ŝi estis ankaŭ taŭge vestita, Aida Čižikaitė esperantigis ŝiajn vortojn. En la dancosalono atendis surprizo: la gvidantino dancigis la partoprenantojn laŭ la mezepoka muziko. Forte impresis la salono ornamita per la kapoj de bestoj ĉasitaj en la apuda arbaro.

**Marco Menichetti**






## Franciska Toubale — Aŭstralio

Plej multe mi ŝatas la prelegojn. Ili malfermas al mi la mondon, kiun mi tute ne konas – ekzemple, kiam temas pri astronomio. Ankaŭ la prelegoj pri lingvistiko estas tre interesaj. Dank' al ili mi povas pli bone kompreni kelkajn aferojn kiuj fontas el kulturaj diferencoj. Mi ĝoje atendas la koncerton de JoMo. Liaj prezentadoj estas ĉiam tre viglaj, bone, ke ne mankis loko ankaŭ por danci!



## Eŭheno Kovtonjuk — Ukrainio

Tio estas mia unua BET, la etoso estas tre hejma. Kiam mi venis, mi estis tiom surprizita pri la amikeca etoso, kvieteco kaj bonkoreco, ke mia kapo turniĝis. Mi devis haltigi ĝin, metante ĝin suben! ☺ Antaŭe mi jam partoprenis en pli ol dek BOATADO-j kaj jam tiutempe mi trovis litovojn frata popolo. Ĉar mi mem ofte kunorganizas E-aranĝojn, mi bone komprenas kiom malfacila estas la organiza laboro. Ĉi tiu aranĝo estas perfekta!



## Marco Menichetti — Italio

La enhavo de la kongreso estas ege interesa. La organizantoj scias bone aranĝi eventon, komplimentojn! Kio interesas min plej multe estas la prelegoj de Ilona Koutny, ĉar mi ne venis al BET nur por renkonti la konatojn kaj ekhavi novajn amikojn, sed ĉefe por kleriĝi kaj ĉi tie estas spertuloj de kiuj oni povas lerni. Mi partoprenis BET jam almenaŭ kvar fojojn. Ĉi tiu aranĝo estas kvazaŭ malgranda UK kaj mi ŝatas ĝian kvaliton.




## Youngsoon Kim (Ajvi) — Koreio

Mi partoprenas en BET por la tria fojo. Ĝi estas renkontiĝo de amikoj, kie oni povas interbabili kun miaj geonkloj el *Ekparolu!* Mi ŝatas BET, tial mi revenas. Krome, la prelegoj estas altkvalitaj kaj mi povas multon lerni, ekzemple de Ilona Koutny kaj Amri Wandel. Krome, la koncertoj kiuj montras la lokan kulturon estas allogaj. Kaj la luksa akcepto!

intervjuis **Paweł Fischer-Kotowski**
fotis **Gražvydas Jurgelevičius**

## INVITOJ

# Spertu orientajn dancojn

Mi komencis studi klasikan kaj modernan dancon kiam mi estis knabino, mi spertis diversajn ĝenrojn, kiel dancojn popolajn, latino-amerikajn, renesancajn kaj flamenkon. Ekde multaj jaroj mi studas orientajn dancojn, do mi partoprenas kursojn en danclernejoj kaj seminariojn, kiuj okazas ankaŭ eksterlande, ekzemple mi estis en Maroko, Tunizio, Turkio. Nuntempe mi kunlaboras kun du danclernejoj kaj mi realigas spektaklojn, kaj kun lernejo kaj kiel solistino, dum festoj kun geamikoj kaj dum ferioj. Mi prezentas ventro-dancon specife dum festivaloj, ankaŭ eksterlande kaj dum Esperantaj renkontiĝoj.
La du dancoj, kiujn mi ŝatus prezenti okaze de BET-59 estas: peco de ventro-danco je perkutado, kiu estas parto de la spektaklo *The Canterville Ghost* de Oscar Wilde, ĝi estas iom malhela; peco de indonezia danco kun ventumiloj (de la insuloj Molukoj). Kutime ĉi tiuj dancoj estas prezentataj dum ceremonioj kaj tradiciaj festoj, kaj ilireprezentas la kulturon de tiu ĉi lando, tiu ĉi danco estas milda kaj dolĉa.
**La prezento okazos morgaŭ je 18.30 en la Granda salono, tuj antaŭ la koncerto.**

**Paola Tosato**

**La libroservo** funkcias ĉiutage, ankaŭ dum la ekskursa tago! 10.00 – 12.30 kaj 14.00 – 18.00 en la aŭditorio 107



Amika renkontiĝo en la malnova urbo.

## MORGAŬA PROGRAMO

| | **Ĵaŭdo, la 10-a de julio** |
|---|---|
| **09.00 – 10.30** | Matenmanĝo (memstare) |
| **10.00 – 11.00** | Prelego de prof. Ilona Koutny: “Kolora lingva bildo de la mondo” (*Senata salono*) |
| **11.00 – 12.00** | Prelego de prof. Mark Fettes: “La konsoloj de lingvo-amanto” (*Senata salono*) |
| **11.00 – 12.00** | Prelego de Arno Lagrange: “Stefan Zweig – eŭropa verkisto” (*aŭditorio 403*) |
| **11.00 – 13.00** | Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj (*aŭditorioj: A1/A2 – 306, B1 – 406, B2 – 404, C1 – 405, paroliga – 212*) |
| **12.00 – 13.00** | Baza kurso de la litova lingvo. Gvidas Severija Marija Banaitytė (*aŭditorio 401*) |
| **12.00 – 13.00** | Tria prelego de prof. Amri Wandel pri astrofiziko (*Senata salono*) |
| **13.00 – 14.30** | Komuna organizita tagmanĝo |
| **15.00 – 16.00** | Spektaklo de Birutė Prekevičiūtė *Litovio de Barbora* (*Teatra salono*) |
| **15.00 – 16.00** | Prelego de prof. Laura Brazzabeni: “Instruado de Esperanto en sinkronaj kaj nesinkronaj kursoj” (*aŭditorio 306*) |
| **15.00 – 16.00** | Prelego de Ulrich Matthias: “Esperanto kaj anima frateco” (*aŭditorio 404*) |
| **15.00 – 16.00** | Prelego de Başak Aray: “La turka lingvoreformo” (*aŭditorio 403*) |
| **15.00 – 16.30** | Filmo de Aleksej Salomatov: *Verda Saliko* (*aŭditorio 401*) |
| **16.30 – 17.45** | Spektaklo de Mario Migliucci: *Doktoro Esperanto* (*Teatra salono*) |
| **17.30 – 19.00** | Vespermanĝo (memstare) |
| **18.30 – 19.00** | Lingva ludo “Komprenu min!” kun Mikaelo Lineckij (*aŭditorio 306*) |
| **18.30 – 19.00** | Prezento de Paola Tosato: Orientaj dancoj (*Granda salono*) |
| **19.00 – 21.00** | Koncerto de Kjara (*Granda salono*) |

## PROGRAMŜANĜOJ

· La morgaŭa prelego de **Bert Robertson** “Nerespondataj demandoj” ne okazos.
· La spektaklo de **Birutė Prekevičiūtė** *Litovio de Barbora* komenciĝos pli frue: morgaŭ je la 15-a horo, en la Teatra salono.
· Lingva ludo “Komprenu min!” kun **Mikaelo Lineckij** okazos ĵaŭdon je 18.30.

# FOTOJ DE LA TAGO

fotis **Gražvydas Jurgelevičius**



Duontaga ekskurso. Aida Čižikaitė interpretas.



Grupa foto post la duontaga ekskurso marde.



István Ertl prelegas pri tradukado.




Tim Owen prezentas libron eldonitan de EAB.




Memorfoto de la estona grupo en BET-59.



JoMo petolas sur la scenejo.

## FINANCA SUBTENANTO DE BET-59

iniciatyvos KAUNUI

**KUNFLUO** estas ĉiutaga informilo de BET-59. Redaktoro: Paweł Fischer-Kotowski, ✉ **kunfluo@proton.me**
Kontaktu la redakcion ankaŭ per SMS aŭ unu el la poŝtelefonaj aplikaĵoj: WhatsApp, Telegram aŭ Signal:

✆ **+31 6 19 46 48 37** aŭ **@kunfluo**

en Signal: @kunfluo.2025